# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 16/05/2024 sescentokdeksepa eldono (unua eldono 26/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Esperanta Retradio

Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŬskultadon kaj legadon Ĉiun tagonNe estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn.

KIEL ELEFANTOJ SALUTAS UNU LA ALIAN 13A DE MAJO 2024 (*ROGER SPRINGER*)

## El Goma

Saluton gesamideanoj,

Ni membroj de ANF/Goma dankas vin pro interesiĝi pri nia ANF, kiu prizorgas orfajn infanojn. Kiel ni, vi komprenas, ke nia lingvo unuigas la homajn korojn. Por via informo Jam ni havas orfejon nomatan **„Orfejo Klara Zamenhof "** en kiu ni realigas ĉiujn aktivecojn niajn: instruado de Esperanto, infanoj venadas kaj ludas (mankas al ili pliaj ludiloj) ktp. Sed ni ne povas loĝigi infanojn tie pro manko de rimedoj nutri ilin ĉiutage .

Nuntempe ni trapasas tre malfacilan tempon pro manko de financaj rimedoj por subteni ĉi tiujn infanojn. Ili estas forpelataj el la lernejoj, ĉar ni ankoraŭ ne sukcesis pagi la lernejajn kotizojn por ili. Tial ili maltrafas klasojn kaj ekzamenojn.



Ni do esperas je via malavareco, por ke vi helpu laŭ viaj rimedoj al niaj infanoj, kiuj neniel kulpas pri la daŭraj militoj en nia regiono .

Jen la foto montranta kelkajn infanojn forpelitajn el lernejoj, kiuj enis rekte al mia domo.

Por monsendi vi povas uzi: **PayPal al** cifrank@t-online.de (link sends e-mail) **kun rimarko „georfoj“** Ni kontakteblas ĉe: orfojkongo@gmail.com

Nome ANF Augustin kaj Betti

*Augustin Kakozwa*



# La Manlia Esperanto-Klubo La Manlia grupo



kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 18an de majo estos la tria sabato. VENU! *Rogers*

# El Adelajdo Prelego en biblioteko



Majo estas en Sud-Aŭstralio monato de la Festivalo de historio, kiam tra la tuta ŝtato okazas tre diversaj histori-rilataj eventoj. La biblioteko en Mount Barker, urbeto en la Adelajdaj montoj, akceptis nian proponon havi tie prelegon pri Esperanto kaj Esperanto-personecoj. Nia specialisto pri la aŭstralia movado, Charles Stevenson, plenumis la taskon kaj prelegis al negranda, sed interesata publiko la 6-an de majo. La deĵoranta bibliotekistino ŝatis la eventon kaj ni interŝanĝis ideojn pri eblaj instru-sesioj por plenkreskuloj kaj aparte por infanoj..



*Katja Steele*

**3ZZZ** En la elsendo de la 13 a de majo 2024 vi aŭdas pli pri Afriko : informoj pri la kongreso en Arušo kaj prezento de Burundio, Ĝi enhavas ankaŭ raportojn pri kiel muziko bone efikas sur la sano kaj eblas malkovri la faman virinom Hedy Lamarr.

Mi memorigas vin ke la jarkunveno okazos la 3an de junio en la radiostacio je la 2.30 posttagmeze. Se vi ne povas ĉeesti sendu viajn rimarkojn je la adreso 3ZZZesperanto@gmail.com.

*Franciska Toubale*



https://globalsouth.co/2024/05/12/early-march-nader-estimated-200000-palestinians-killed-in-gaza/

**Esperanto-Tago | UEA**




# La doto de Klara, la dinosaŭroj, Unesko, la Esperanto-tago: kion komunan ili havas?

## *Unuavide nenion, sed duavide ĉion.*

Renato Corsetti

La doto de Klara estas la mono, kiun Zamenhof elspezis por konigi sian lingvon al la mondo.

Kial li faris tion? Ĉar li esperis interfratigi la popolojn kaj ĉesigi la interpopolajn luktojn, kiuj abundis en lia epoko. Sed ĉu en la nuna mondo la kvanto da interpopolaj luktoj estas malpli ol en la tempo de Zamenhof? Mi dirus, ke ili estas eĉ pli multaj kaj pli danĝeraj. Pro tio en momento, kiam ĉiuj parolas pri milito kaj militaj elspezoj, estas nia tasko kiel sekvantoj de Zamenhof fari same kiel li. Ni parolu pri paco kaj disvastigu nian lingvon de paco, alivorte, ni uzu niajn rimedojn por informi neesperantistojn pri Esperanto.

La agado por ke Unesko deklaru la 26-an de julio Internacia Tago de Esperanto, estas ĝuste agado imite al Zamenhof, pro la efikoj, kiujn ĝi povus havi je la tutmonda publiko. Ĝi postulas grandan informan klopodon, kiun devas fari ĉiuj landaj asocioj. Ili devas informi pri Esperanto kaj pri la celoj de Esperanto siajn Unesko-komisionanojn kaj siajn diplomatojn, kiuj repezentas la landojn okaze de la Ĝenerala Asembleo de Unesko en 2025 en Samarkando. Eĉ se en la fino la deklaro ne okazus, la informado restos, ĉar la novaĵo pri la propono estas io, pri kio la gazetaro povas interesiĝi.

UEA pere de tiucela labor-grupo jam kontaktis ĉiujn aziajn kaj eŭropajn landajn asociojn kaj ricevis reagojn pli pozitivajn ol tiuj de la antaŭa simila peto antaŭ kelkaj jaroj. De nun estos la vico de la afrikaj kaj amerikaj landaj asocioj.

Sed, preter la deklaro aŭ nedeklaro de la Ĝenerala Asembleo de Unesko, la Esperanto-tago estas la nacia festo de esperantistoj. Do oni faru tion, kion aliaj faras okaze de la nacia festo. Oni estu fiera pri si mem, oni aranĝu tedajn paroladojn de prezidantoj pri nia movado, sed ni ankaŭ organizu pli gajajn eventojn, festojn, promenadojn, kunmanĝojn, Oni svingu la flagon, ne materie, sed figure en la senco, ke oni parolu pri la festo kaj pri Esperanto al la neesperantistoj. Nun la monda situacio ne estas pli bona ol tiu de 1906, kiam Zamenhof faris sian fortan inaŭguran paroladon en la UK en Ĝenevo. Nuntempe, same kiel tiam, ni parolu kun Zamenhof, parolu pri paco kaj pri Esperanto kiel rimedo de interkompreniĝo survoje al paco. Ni klarigu kiel per Esperanto eblas garantii la respekton al la lingvaj rajtoj de ĉiuj.

Bedaŭrinde ni kaj Unuiĝintaj Nacioj estas la solaj sobruloj en grupo de ebriiĝintoj pri forto. Nia voĉo kiel tiu de UN ofte estas ignorata, sed ni kaj UN daŭrigu ĉar tiuj ebriuloj ne nur pretas je la fina Harmagedono, sed ankaŭ kapablas detrui la planedon. La dinosaŭroj estis pli saĝaj, ili pereis ne pro propra kulpo. Ni nun estu saĝaj kiel la dinosaŭroj kaj provu rezonigi la homojn.




Konklude mi petas vin pri kelkaj bazaj aferoj: – konscii pri tio, ke vi estas esperantistoj kaj sekve parto de la homaro, kiu provas savi la mondon; – konscii, ke la 26-a de julio estas nia komuna festo, la Esperanto-tago; – festi tiun feston, por ke ankaŭ neesperantistoj, kaj ĉefe Unesko, rimarku ĝin; – informu pri ĝi kaj pri Esperanto neesperantistojn per afiŝoj kiel la ĉi-kuna, kaj per aliaj materialoj, kiujn UEA liveros; – kaj fine petu viajn landajn gvidantojn, ke ili reagu al la iniciato de UEA pri la deklaro de la 26-a de julio kiel Internacia Esperanto-Tago.



**Sekvu kaj abonu la Gazetarajn Komunikojn de UEA por informiĝi pri freŝaj novaĵoj ĉe:**

***https://uea.org/aktuale/komunikoj***